Christian Friedrich David Schubart,

La truto

tradukita de Ludwig Schödl

En riveret' malvarma,
Ja en petola ag'
Kaprica truto ĉarma
Saltetis kiel sag'.
Mi staris ĉe la bordo,
Rigardis kun plezur'
La fiŝon en akordo
Kun rivereta pur'.

Malice kun intenco
Ĉe l' bordo gvatis vir'
Kun vergo, kun fimenso
La truton kun dezir'.
Se l'akva kristaleco
Nur restos, pensis mi,
Al fiŝa libereco
Atencus vane li.

Sed nun senpacience
La fiŝkaptont' aĉigas
Akvon li intence
Kaj jam el ĝia ond'
Trompitan truton tiras.
Kaptita, ho karul',
La koron vi disŝiras
Amata, vi ĉarmul'!

....
....,
....
....
....
....,
....
....

Traduko de la Germana poemo "Die Forelle" de Christian Friedrich David Schubart *(∗1739-03-24 – †1791-10-10) en Esperanton de* Ludwig Schödl *(∗1909-10-31 – †1997-02-20).*

Arg-832-1670 (2013-02-20 09:46:20)

Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la kantlibreto „Ni kantas“, eldonita en 1980 de la Centra Laborrondo Esperanto de Kulturligo de GDR, redaktita de Ludwig Schödl. Pri la tradukinto vidu la vikepedian retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_SchΓydl.`